

**Printempo**

**en**



**aŭtuno**

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE  
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

**ILEI**

SEPTEMBRO 2001

N-ro 3 (98)

## Pri la lingv'ajo kaj ortografio<sup>1</sup> de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vort'radikojn. Tiuj ĉi vortoj aperis en: **Esperanto, Minimum szótár** (1995), kiu jam plene elĉerp'iĝis. Nun ili estas alir'eblaj ĉe Interreto, en la hejmpaĝo de Juna Amiko: <http://www.banyai-kkf.sulinet.hu/esperanto>

**Krom-signoj**, kiuj helpas komenc'antojn:

**Divido-streko(-)** troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

**Vertikala strek'eto (')** signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'iĝi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto revenas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino... ) ni ne uzas kromsignon.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo.



*Sur la titol'paĝo:*

*Printempo  
en aŭtuno*

*Fotoportreto de  
Anarie White,  
Richmond, Usono*

## Gravaj ŝanĝoj

*La 2an kaj 3an de junio en la hejmo de Stefan MacGill, vic'prezid'anto de ILEI, afer'gvid'anto de nia gazeto, kun-venis ses aktivaj esperantistoj por trans-preni de li grandan parton de la administra<sup>1</sup>, distribu<sup>2</sup> laboro de Juna Amiko. Tiu ĉi grava kaj tempo-raba tasko ĝis nun plen'peze premis la ŝultrojn de Stefan MacGill.*

*Estis far'itaj gravaj decidoj por la est'onteco de Juna Amiko. Pri inform'ado kaj varb'ado zorgos nia kun-labor'anto Zoran Ćirić el Niš, Jugoslavio; la administraj, abonaj aferoj kaj la distribu'ado apartenos al Sándor Hideg el Leányfalu, Hungario. Liaj help'antoj restos plu Perlo Miela kaj Boris. Tiele, la laboro de Stefan MacGill estas trans-don'ita al du ĉef'personoj. Esper'eble tio iom liber'igos nian tro-ŝarĝ'itan vic'prezid'anton, al kiu en la nomo de la redakcio kaj de la tuta leg'ant'aro de nia revuo mi plen'kore dankas pro la ĝis-nuna enorma<sup>3</sup> laboro por Juna Amiko. Ni ŝuldas al li ne malpli ol nian ekziston.*

*Sam'tempe, mi bon'ven'igas niajn novajn aktiv'ulojn kaj deziras al ili el-ten'emon kaj grandajn sukcesojn en la servo de nia leg'antaro.*

*Amike:*

*Geza Kurucz  
redaktoro*

1. teknika, afer'gvida / 2. en-poŝt'iga, dissenda / 3. apenaŭ el-port'ebla.

# EN KIA MONDO NI VIVAS?

- 1,2 miliardo da homoj ne posedas sufiĉe da mono.
- 850 milionoj da homoj estas analfabetoj.
- 800 milionoj da homoj ne ricevas sufiĉe da nutr'aĵo.
- Pli ol duono de la homaro vivas per malpli ol po 2 dolaroj tage.
- La viv'nivelo de multaj evolu'landoj falis je 15% dum la lastaj 30 jaroj.
- 34,5 milionoj da homoj vivas mizere en Usono, 12 milionoj en Britio, 6 milionoj en Francio.
- Pli ol 1 miliardo da homoj ne profitas de sanitaraĵaj progresoj.
- 11 milionoj da infanoj mortas ĉiu-jare pro malbonaj viv'kondiĉoj.
- 40 milionoj da infanoj vivas sen familia helpo.
- 110 milionoj da infanoj neniam vizitas lernejon.

*Laŭ "Sennaciulo" el la marta n-ro de ICEM-ESPERANTO\*  
\*Internacia Cefado por Eduk'ado Moderna*

## Ĵuro de novaj esperantistoj

Ho Esperanto! Nia am'!  
Ni nin al vi dediĉis jam.  
Ni ĵuras<sup>1</sup> en anima flam',  
ke restos kune por ĉiam'.  
Do ni deklaras kun honor',  
ke servos nun al via glor'  
de nia vivo ĉiu hor';

kaj ĉiu penso, rid' kaj plor';  
kaj bela vort' de orator'<sup>2</sup>;  
kaj ĉiuj fortoj de memor'  
de niaj kantoj bel'sonor';  
kaj ĉiu bato de la kor';  
kaj tuta mono de sponsor'<sup>3</sup>!

*Valentin MELNIKOV, Rusio*

1. vokas kiel atest'anton Dion aŭ alian respekt'atan personon / 2. parol'isto / 3. apog-anto per mono.

*En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela kunlaboranto, el-stara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)*

## 15 Nikolao Kurzens

Kio estas liriko? La vorto devenas el la greka lingvo. Ĝi servas por liro, tipo<sup>2</sup> de muzik'ilo kaj iam signifis ankaŭ poemon, kiun oni kantis kun akompano de liro. Hodiaŭ liriko signifas mallongan, melodian poemon, kiu esprimas personajn pensojn kaj emociojn<sup>3</sup> de la poeto<sup>4</sup>. Liriko ne rakontas, ĝi esprimas privatajn sentojn, privatajn pensojn. Kiel atend'eble, tiaj pensoj, tiaj sentoj povas esti tiom variaj, kiom estas la poetoj mem. Ili povas esti gajaj kaj ĝojaj, sed ankaŭ malgajaj kaj mal-vigljaj, ili povas esti optimismaj<sup>5</sup>, sed ankaŭ pesimismaj<sup>6</sup>.

**L**a poeto, kiun mi prezentas al vi hodiaŭ, verkis lirikajn poemojn de la dua speco. Liaj lirikoj esprimas lian pesimismon, lian sen-esperon, liajn animajn suferojn. Sed tion li faras per sen-makula arto, kiu

donas al li lokon inter niaj plej bonaj poetoj.

# BILDOJ EL LA HISTORIO

**T**iu poeto estas la latvo Nikolao KURZENS. Li naskiĝis en 1910 en la urbo Alūksne en Norda Latvio. Li laboris kiel ŝtat'ofic'isto en Riga, la ĉefurbo, kie li ankaŭ studis ekonomikon<sup>7</sup> en universitato<sup>8</sup>. Li lernis Esperanton kiel jun'ulo kaj, poste, aktive partoprenis la Esperanto-ag'adon de Latvia Esperanto-Societo en Riga, fariĝis ĝia vic'prezid'anto kaj redaktoro de Esperanta revuo. La militaj kaj post'militaj jaroj estis por li malfacilaj, kaj li ne plu partoprenis la latvan Esperanto-movadon post ĝia re-nov'iĝo en 1957. Li mortis en 1959.

**E**n 1938 aperis lia sola poem'aro, *Mia Spektro*<sup>9</sup>. La titolo mal-kovras la personan karakteron de liaj poemoj, kiuj montras sentojn kaj sin-tenojn de-ven'antaj el unu sama fonto, simile al la diversaj koloroj, deven'antaj el unu fonto de lumo. La diferenco estas, ke la sent'ara spektro de la poemoj de Kurzens havas sian fonton de

*Ni lernas kompromisi kaj duoni,  
prunt'itajn pensojn servo-prete*  
citas.

*Kaj iam nur, sub sprono alkohola  
sin ŝiras el la cerb' haose bola  
kaj provas kapon levi pens' aŭdaca.  
Sed vane ĝi alarmon gongi provas:  
la korp' inerta sin jam plu ne*

*movas –  
ĝi estas laca, peze, morte laca...*

(Tempo pasas)

# LITERATURO DE LA ESPERANTA

melankolio<sup>10</sup>, sed ne de hela lumo. Tio elektas por li temojn de senespero kaj deprimio<sup>11</sup>. Sed tiujn temojn li sukcesas transformi en arton de disciplino<sup>12</sup>, kie trafa elekto de vortoj kaj formoj kun-agas kun la temoj por krei individuan voĉon de poeto:

*Dum juno ĉiu vojo nin invitas  
kaj ĉiu floro ŝajnas sin proponi;  
Sur pint' plej alta ni aspiras troni,  
eĉ pens' pri cedo morde nin incitas.*

*Sed tempo pasas.*

*Jaroj preter-glitas,  
La spitan "ni"  
flank'ŝovas grasa "oni".*

Sed malgraŭ la reg'anta malgaja tono, en la poemoj de Kurzens oni povas ankaŭ konstati agnoskon<sup>13</sup> de la neceso aktive kontraŭ-batali la senesperon de la viv'rutino<sup>14</sup>:

*Ĉu estas inde – fuĝi tim'ig'ite  
dum bleka bruo de frakasa fero,  
ŝtel'iĝi for, flank'umi for evite  
de l' vivo-ver'?*

*Ja kion helpas plendo kaj lamento,  
ja kion – plor', sopiro kaj suspiro?  
Ne kaŝu vin! Ek-paŝu kontraŭ vento  
kaj estu vir'.*

(Ĉu estas inde?)

**S**ed la pesimismo tamen karakterizas la poezion de Nikolao Kurzens. Oni povas diveni, ke li ofte suferis pro daŭra psika<sup>15</sup> deprimado. Eĉ lia

sin-teno al la naturo estas plena de dubo, li ne povas akcepti senrezerve la al-venon de printempo kiel la plen'um'iĝon de liaj belaj esperoj:

*Ĉu vere verdas ree la bulvardo,  
ĉu vere venis la printemp' denove?  
Sen kred', sen viglo, lace kaj sen-pove  
kaj kvazaŭ time palpas la rigardo:  
Ĉu ver'? Ĉu vere verdas la bulvardo?*

(Majo!)

**S**ed ne lasu la pesimisman tonon de liaj poemoj for-tim'igi vin. Kurzens estas antaŭ ĉio artisto de la vorto. Liaj poemoj estas mallongaj, neniu vorto troas, la esprimo estas rekta, trafa kaj neniam ĉirkaŭ-vojas

la temon. Kurzens neniam celas arte-far'itan original'econ, li ĉiam esprimas sin sen ia ajn afekto<sup>16</sup>. Ni kredas lin, kun-sentas kun li kaj re-konas lian personon kvazaŭ nian intim'ulon. Tial liaj poemoj vivas kaj plu-vivos kun ni.

1. hav'ajo ricev'ita post antaŭulo(j) / 2. speco / 3. sentojn / 4. poem'verk'isto / 5. espero-plenaj / 6. mal-optimismaj / 7. sciencon pri mastr'um'ado / 8. supera lernejo / 9. divers'eco de koloroj, humoroj, sentoj / 10. mal-gaja humoro / 11. plena manko de vivo-ĝojo / 12. spirita ordo; povo sin regl / 13. re-konon / 14. viv'kutimo; onia ag'maniero / 15. mal-korpa, mal-fizika / 16. ŝajn'igo de decaj sentoj.

Nikolai KURZENS

## LA NOVA TAGO

*Ne spiru: «ho!», ne diru: «se...»,  
ne serĉu savon el pere'  
en nuboj de l' imago.  
Vin levu kun decida vol':  
ĉi hor' ne estas por parol' –  
nur agon sekvas pago.*

*Ne la suspiroj de l' sopir' –  
nur rekta kaj decida ir'  
nin savos de la plago.  
Ne el miela amo-kver' –  
el dura fer', el firma ter'  
sin levos Nova Tago.*

# Alarmaj<sup>1</sup> antaŭ-signoj

## Scienc'uloj vane alarmas

Ek-de 1972 la scienculoj alarmas la hom'aron pro tuttera alt'iĝo de la temperatu-ro<sup>2</sup> de aero. Ŝanĝ'iĝo de la klimato<sup>3</sup> ven'iĝas katastrofajn<sup>4</sup> sekvojn por ĉiuj vivaj est'ajoj. Malgraŭ saĝaj, avertaj vortoj la homo fermas la okulojn kaj plu poluas<sup>5</sup> sian medion<sup>6</sup> en rapid'iĝ'anta ritmo kaj sen ajna respond'eco. La plejmulto blinde sekvas la vojon de sen-zorga ekspluat'ado<sup>7</sup> de la natur'fortoj. Ĉu vi scias, ke 80% (procentoj) de ĉiuj natur'fortoj estas konsum'ataj de la evolu'intaj industriaj landoj! Por la ceteraj tri kvaronoj restas nur 20%! Mal-juste, ĉu ne?


## Nunaj aŭ baldaŭaj sekvoj

Per polu'ado altiĝas la temperaturo, ŝanĝiĝas la klimato, degelas<sup>8</sup> glaci'amasoj ĉe la poluso<sup>9</sup>, altiĝas la mar'nive-  
loj, sekve sub-akv'iĝas multaj apud-bordaj regionoj, ek-  
estas inundoj<sup>10</sup>, al'flanke dezert'iĝas vastaj kulturregi-  
onoj, sekve akr'iĝos zorgoj de nutr'ado, mortos pli da  
mal-riĉ'uloj pro mal-sato.

Kaj ne opiniu, ke mi parolas pri nebula fora est-  
ont'eco. Tute ne. La unuaj signoj jam montr'iĝas en  
ĉiu regiono.

## Kion, do, fari?

Komprenu, ke vi estas konsist'iga parto de la naturo.  
Vi ne havas rajton detrui, konsumi ĉion sen re-pro-  
dukti, re-nov'igi! Ŝparu per energio, akvo, konservu la  
medion, kiu vin ĉirkaŭas, fizike vivu modere<sup>11</sup>,  
spirite riĉe.



*Inundo*

*Geza KURUCZ, Hungario*

1. alarmi: averti pri danĝero / 2. grado de varm'eco / 3. veteraj kondiĉoj / 4. danĝer'egajn / 5. mal-pur'iĝas / 6. naturan ĉirkaŭ'ajon / 7. sen-zorga al-prpr'iĝ'ado por granda profito / 8. fluid'iĝas / 9. la du plej mal-varmaj regionoj de la ter'globo / 10. super-akv'egoj / 11. uz'ante nur tion, kion vi nepre bezonas, sed ne uzante super-flu'ajojn.

# INTERESAĴOJ

## SALO

Antaŭ multaj jar'centoj salo estis konsider'ata kiel trezoro. Tiu-tempe oni komencis bonven'igi gaston – poste la kutimo far'iĝis ĝenerala – per salo kaj pano. Iom poste, salo kaj

pano, kune konsum'itaj, estiĝis simbolo de amik'eco. En la mez'epoko respekto al la gasto esprim'iĝis per tio, kiel proksime li havis sid'lokon al la sal'ujo.\* (*Vidu p. 9*)

## EL LUDILO MEDICINA INSTRUMENTO

Hipokrato rimarkis, ke se li alpremas la oreilon al la brusto de la mal-san'ulo, li povas bone aŭdi la kor'batojn. Dum dumil jaroj, la posteuloj de Hipokrato nenion ŝanĝis. Sed en la jaro 1816, la profesoro de medicina fakultato de Parizo, *René-Teophile-Hyacinthe Laënnec* ekhavis ideon, kiun donis al li la hazardo.

Dum-voje al la malsanuloj, li vidis knabojn ludi en la strato. Ili tenis tubon en la mano kaj frapet'ante ĉe unu ekstremo ili sendis

signalon unu al la alia. Vid'eble la tubo bone kondukis la bruetojn. Laënnec ek-meditis, kio okazus, se li sammaniere ekzamenus la

koron. Ven'inte al la unua malsanulo li volvis tubon el paperfolio kaj metis ĝin al la brusto de la malsanulo. Kun surprizo

li konstatis ke tiel li multe pli bone aŭdas la korbatojn.

Tiam li eĉ ne pensis, ke li inventis unu 'el la plej gravaj instrumentoj de la interna medicino – la stetoskopon.

*Elizabeta Rajtmár, Hungario*



## *Abon'tarifo de Juna Amiko por la jaroj 2001 kaj 2002*

	EUR	USD	2-4 ekz.	Ekde 5	Altre
Tarifo 1	11	10	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 2	6	5,60	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	4	3,60	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF		480 HUF	420 HUF	—





## PRI LA MIGR'ADO DE LA BIRDOJ

De-longe oni scias, ke iuj birdoj mal-aperas pro vintro. En antikva tempo, kelkaj opiniis, ke ili vintrumas en ŝlimo<sup>1</sup>. Aliaj diris, ke ili pas'igas la vintron en la fundo de lagoj aŭ kav'ajoj de maljunaj arboj, kaj eĉ, iam episkopo<sup>2</sup> verkis studon pri tio, ke certaj birdoj flugas al la Luno, antaŭ ol ek-frostas.

La vero, kiun konstatis *Karl Linné*, havas malpli da fantazio<sup>3</sup>.

La birdoj – kiuj nutras sin per verd'ajoj de diversaj kresk'ajoj, aŭ per vermoj kaj insektoj – ne povas akiri por si nutraĵon en vintraj monatoj. En aŭtuno ili devas, do, migri al landoj pli varmaj, kie ne mankas al ili manĝ'ajo.

La migraj birdoj trans-lok'iĝas ne sam'tempe. Iuj komencas sian vojaĝon jam en aŭgusto, aliaj nur en la komenco de novembro. Ili flugas plurajn milojn da kilometroj, la cikonio<sup>4</sup> flugas, ekzemple, el Eŭropo al Suda Afriko, ili “vojaĝas”, do, 10 mil kilometrojn.

Kiom da kilometroj ili pasas en unu tago? La kant'birdoj pasas ĉirkaŭ 60 kilometrojn, la cikonio 200 km kaj iuj birdoj eĉ pli.

Rekordon havas iuj orient-aziaj birdoj, kiuj sen halti por ripozi transflugas al la Havaja insul'aro. La distanco estas 4000 kilometroj!

Por pli bone orient'iĝi, ili flugas en la alt'eco de 2-3000 metroj. La direkton montras al ili riveroj bril'antaj ankaŭ dum-nokte. Ili evitas vojon, kiu longe kondukas super sen-lima akvo-spaco (oceanoj aŭ grandaj maroj).

De kie ili prenas la sperton orient'iĝi pli bone ol piloto<sup>5</sup>? Certe gravas la de-naska instinkto, la magneta al-tir'forto de la tero, la flu'direkto de varmaj aer'ondoj, kaj krome kaj ĉefe, la sperto de la aĝaj migraj birdoj.

Por pli multe scii pri la migraj birdoj, ek-de la 80-aj jaroj de la 19-a jar'cento laŭ iniciato<sup>6</sup> de dana instruisto *Martensen* bird'istoj ring'izas la pied'etojn de la migraj birdoj kaj tiel oni povas ident'iĝi individuojn kaj sekvi ilian flug'vojon. Se vi havas emon al tia nobla laboro, serĉu kontakton kun lokaj birdistoj.

*Zoltan Kurucz, Hungario*

1. mola sur-fund'ajo de riveroj; tre mola tero / 2. ĉef'pastro / 3. imago-povo / 4. birdo kun longaj ruĝaj beko kaj kruroj / 5. konduk'isto de flug'maŝino / 6. komenco de io nova kaj grava.

**\* Sed ĉiokaze male, oni ne tro fidu aloni! Salo ekzistas en ĉiuj materoj kaj aldoni salon al la manĝaĵoj povas esti danĝere por iuj homoj.**

## Kiel estiĝis la

### ARBARO DE ZAMENHOF\*?

**K**iel infano, sinjorino *Aini Väärä-niemi* ofte ludis en la malnova arbaro de sia familio kun fratinoj kaj ge-kuzoj. Tie ili tra-vivis sian propran fabelon. Kiam pasis la jaroj, ŝi jen kaj jen denove en-iris tiun magian<sup>1</sup> arbaron por tie re-vivi la misteran<sup>2</sup>, karesan<sup>3</sup> etoson<sup>4</sup>, kiun ŝi spertis tie inter la maljun'egaj arboj kaj grandaj ŝton'egoj. Vin-tre ĉion kovras neĝo. Tie flug'adas birdoj kaj vag'adas bestoj.



**A**ini plen'kreskis kaj ek-havis proprajn ge-filojn. Kun ili, ŝi re-vizit'adis la saman arbaron, kaj ŝia plej aĝa infano, Henri nomis la lokon Fabel'arbaro. Kiam la literatura *Päätalo-instituto*<sup>5</sup>, kiu situas en ilia hejm'regiono, laŭ iniciato<sup>6</sup> de Aini, deklaris tut'mondan Esperantan fabel'konkurson en la jaro 2000, Aini ek-deziris organizi ion tiu-rilatan en la Fabelarbaro. Ŝi ankaŭ deziris, ke la arbaro havu Esperantan nomon. Ŝia-opinie, ĝi estis sufiĉe valora por esti dediĉ'ita al *L.L.Zamenhof*, kaj tial, ŝi nomis sian arbaron Arbaro de Zamenhof.

**F**ine de junio 2000, Aini markis tri el la plej malnovaj pi-ceoj<sup>7</sup> per lignaj ŝildoj<sup>8</sup>: *Arbo de Homaj Rajtoj*, *Arbo de Paco* kaj *Arbo de Egal'eco*. La unua jam havas proksim'ume 250 jarojn kaj ankaŭ la aliaj pli ol 100. Dum Esperantotago, okaz'inta en la hejm'vilaĝo de Aini, en julio 2000, unu el la plej eminentaj finnaj esperantistoj, s-ro Allan Mehtonen, elektis *Arbon de Finnlando*. Post kelkaj tagoj ĉe Aini gastis, pasport'serve, polo, Pjotr Stankowski, kiu elektis la unuan internacian arbon. Al Aini tre plaĉas, ke ĝi estas *Arbo de Pollando*. Pollando estas tre proksima al ŝia koro, ne nur kiel hejm'lando de Zamenhof, sed ankaŭ kiel lando, kiun ŝi mem vizitis dekojn da fojoj kaj ek-amis, kiam ŝi laboris kiel ŝipa telegraf'isto<sup>9</sup>.

De 2001, en la Arbaro de Zamenhof oni jam vidas, krom la supre menciitajn arbojn, la arb'egojn dediĉ'itajn al Hispanio (elek-

tis Rafael Blanco kaj Xavier Rico Iturrioz), *Francio* (elektis Floreal Martorell kun sia familio), *Usono* (elektis Amanda Highley), *Kroatio* (elektis fabelkonkurs'ano Stefani Strunjak kaj ŝia instruistino Judita Rey-Hudeček), *UEA*<sup>10</sup> (elektis Osmo Buller). Plue, dum la oktobra Fabel'semajno 2000, la finna "Joulupukki" (Jul'avo), kiu venis rekte el la premiita fabelo de Stefani por renkonti ŝin en la arbaro, rajtis propr'igi al si unu el la piceoj. Sam'okaze la ĉeest'antaj infanoj (*Stefani* kun *Henri*, *Sauli* kaj *Pauliina Vääräniemi* kaj *Elina*, *Kirsi*, *Niina*, *Ismo*, *Juho* kaj *Anna Tauriainen*) kune elektis *Arbon de Amik'eco* kaj pend'igis lignan ŝildon sur ties branĉo.



*hof situas*<sup>11</sup> en la vilaĝo *Metsäkylä*, en *Taivalkoski*, Finnlando, iom pli ol 100 kilometrojn sude de la *Polusa Cirklo*.


**L**a deziro kaj celo de Aini Vääräniemi estas, ke la esperantistoj de la mondo povu renkont'iĝi en la Arbaro de Zamenhof kaj kune ĝui tie la trankvilon de la naturo, internacian amikecon kaj Esperanton.

Laŭ la sciigoj de  
Aini Vääräniemi  
*Raita Pyhälä*,  
Finnlando

\**Arbaro de Zamenhof*

1. magio: povo kvazaŭ super-natura / 2. sekreto-plena / 3. mildan, agrablan / 4. ĝeneralan humoron de la ĉeest'anto(j) / 5. konstanta organiza kaj administra centro / 6. komenco de io nova kaj grava / 7. piceo: speco de ĉiam-verda arbo / 8. tabuloj kun sur-skriboj / 9. fak'ulo kiu flegis sen-fadenan elektronikan kontakton kun la mondo / 10. Universala Esperanto-Asocio; centra tut'monda organiz'ajo de la esperantistoj / 11. trov'iĝas.

# NOV-tipa enigmo



Redaktis:

**Dieter BERNDT**  
Germanio

En tiu ĉi unika enigmo ni donas al vi ne nur la difinojn, sed ankaŭ la direkton de la vorto-linio. Ekzemple: 11 – 8 (2 literoj iras supren, 2 literoj malsupren).  
*Al- iru kuraĝe!*

1 – 6 Ĝusta rilato inter diversaj sonoj;

2 – 5 Lev'iĝ'anta akvo-amaso;

4 – 9 Preciza loĝ'loko;

5 – 8 Rivero en Eŭropo;

11 – 8 Rivero en Francio;

12 – 7 Ujo por manĝi;

14 – 11 Grasa flu'ajo;

15 – 10 Virina nomo;

16 – 3 Japana vest'ajo;

17 – 2 Etend'ajo de akvo;

17 – 14 Linio inter landoj;

18 – 13 Vira nomo.

*La ĝustajn solvojn vi trovas sur la paĝo 27.*


**NE PRETER-PASU LA OKAZON!**

*En marto aperos la jubilea numero*

**n-ro 100 de Juna Amiko**


Sendu al ni vian kontribu'ajon ĝis la 31.12.01.

**VENU, NI REDAKTU ĜIN KUNE!**



Jen mi, via gvid'anto, Nina, denove. Ĉu mia vestaĵo estas moda? Mi nun gvidas vin al loko, sekreta loko, kiu plaĉas al infanoj. Kiu loko? Vi divenu! Rigardu la bildon. Kion vi vidas? Kiujn vi vidas? Nun via vico! Divenu!


**Divenu, kie ni estas!**



**STEL'SALUTO**

*Per raketo al la steloj  
Serĉi vivo-formojn;  
Kun okdek-brakaj belo  
Ni kreu novajn normojn.*

*Amik'econ ni ek-signu,  
Modifante la salutojn.  
Pri man'prem'ado ni rezignu  
Daŭros dek minutojn.*



Ĉu vi ŝatus esti en tiu loko? Kion vi vidus? Kion vi aŭdus? Kion vi sentus? Ĉu vi timus? Kiuj danĝeroj estus? Kiuj plezuroj estus? Kion vi farus? Kial? Nun, turnu la paĝon por scii pli kaj pri-juĝi vian divenon.





Jen naŭ diroj de naŭ infanoj (*daŭrigo*):

- ④ "Mal-rapide ni iris supren, sed poste ege rapide suben, poste dekstren kaj maldekstren."
- ⑤ "Mi ankoraŭ ne havas stir'permeson, sed mi bone sukcesis turni la stir-radon kaj kolizii kun la veturilo, en kiu sidis miaj amikoj. Ili saltis supren kaj mi ege ridis."
- ⑥ "En la mallumo oni aŭd'igas romantikan muzikon kaj mia amiko kisis min. Mi ankoraŭ ne decidis, ĉu mi ĝojas aŭ ne."
- ⑦ "Mi vidis plurajn fantomojn, orgon<sup>1</sup>, monst<sup>2</sup>, skeleton kaj sorĉ'ist'inon<sup>3</sup> sur bala'ilo kun nigra kato."
- ⑧ "Mi ne timis, ĉar ni malrapide iris, kaj mi ne timas pro alt'eco De la supro ni ĝuis bel'egan el-rigardon super la tuta parko kaj la urbo."
- ⑨ "Ni en-iris kaj ek-iris. Ni vidis la lunon, kometojn<sup>4</sup>, planedojn kaj stelojn. Fine, ni eniris aerolitan<sup>5</sup> ŝtormon<sup>6</sup> kaj zigzagis inter la spacaj rokoj. Estis timige!"

*Unu agado per ludilo denove ne havas pri-skribon. Kiu?  
(Respondoj en la sekva numero.)*

### **Formu grupojn de du ĝis kvar amikoj.**

Vi vizitos la amuzparkon. Ĉiu havas cent stelojn\*. Jen la prezoj de la amuz'ajoj (po-persone). Decidu, kiujn amuzajojn vi elektos. Provu konvinki la aliajn pri la ludiloj, kiujn vi pleje ŝatas. Almenaŭ kvar amuzajojn vi vizitu komune, aliajn vi vizitu aparte, se vi ne povas konsenti.

**Ondotrajno — 30**

**Raketo — 30**

**Glittrogo — 25**

**Fantomdomo — 25**

**Frapaŭtoĵ — 20**

**Giganta rado — 20**

**Fotoj sur luno — 15**

**Amtunelo — 15**

**Speĝullabirinto — 10**

**Karuselo — 10**

\* Mon'umuo.

### **SOLVO DE VORTMIKSOJ (n-ro 97, p. 16)**

1. mikrofono; 2. biletejo; 3. dekoro; 4. malaplaŭdanto; 5. najbaro; 6. ridigi  
MIRINDAJ MARIONETOJ

**Lars FORSMAN**

gvid'anto de Esperanto-fako  
de Karlskoga Popola Alt'lernejo,  
estr'ar'ano de la Sveda Esperanto-Instituto



## *Esperanto signifas por mi...*

Mi mal-inkline<sup>1</sup> inform'iĝis pri Esperanto en mia lernejo. Mi ja estas lingvo-instruisto kaj ne okup'iĝas pri strangaj aferoj. Dum du jaroj, mi kontraŭ-staris al obstina<sup>2</sup> varb'ist'ino, sed fin'fine mi promesis iom rigardi lerno-libron kaj tuj entuziasm'iĝis<sup>3</sup> tiom, ke mi ek-lernis la lingvon.

Tio, kio interesis min, estis la logika gramatiko preskaŭ sen esceptoj, la vorto-trezoro<sup>4</sup> de multe da lingvoj kaj la genia<sup>5</sup> vorto-far'ado pere de afiksoj<sup>6</sup>. Mi pensis, ke la lingvo povus esti bona baza lingvo kaj mi eĉ komencis ĝin instrui en vesperaj rondoj.

En 1988 mi ricevis la rajton de la instruista konferenco prov'instrui Esperanton dum ok semajnoj. Sed, ĉar la lernantoj je la kurs'fino ne volis hejmen-iri, ĝi fariĝis tut'semestra<sup>7</sup>, kaj ĝis nun mi jam instruis stud'antojn el kvardeko da landoj en tutsemestraj kursoj kun 22 horoj semajne. La instru'ado estas tute en Esperanto, de la vera komenc'anta nivelo ĝis la internacia ekzameno je la fino de la kurso. Multaj el miaj stud'intoj hodiaŭ uzas Esperanton mult'maniere kaj divers'lande.

Pli kaj pli mi komprenis ankaŭ la internan ideon de la lingvo. Ĝi ne agas por for-bati aliajn lingvojn, sed por sub-teni ĉies rajton uzi sian lingvon kaj kulturon. Hodiaŭ politik'istoj, instruistoj kaj pens'uloj en gazet'aroj serĉas la vojon al vari'eco, just'eco kaj demokratia lingvo-politiko en la mondo, sed agas kontraŭe. Ili uzas nur unu lingvon el la 6000 de la mondo. La mankon de lingvaj kaj kulturaj variecoj hodiaŭ oni trovas en la film'industrio. Manke de alt'kvalitaj konkurencoj<sup>8</sup>, mal-multe-kostaj kaj sen-respond'ecaj filmoj kaj videoj abundas en la angla lingvo tiel ke por ge-junuloj tra la mondo "distra per-forto" estas tute natura afero. Fakte kulpas niaj aŭtoritatoj<sup>9</sup>, kiuj ne komprenas la gravecon de ident'eco kaj varieco. La pli-multo ankoraŭ ne komprenas la ideojn de Zamenhof, kiu antaŭis sian tempon je pli ol cent jaroj.

Mi tamen ĝojas, ke multaj lernantoj sen antaŭ-juĝoj komprenas la valoron de Esperanto en nia mondo. Dum somera kurso ĉi-jare, tri jun-



# KONSTANTA KONKURSO POR VI en

VI povas partopreni en la kvizo post ioma ajn n-ro. Provu mezuri viajn sciojn lingvajn kaj kulturajn. Ne forgesu, ke solv'ante la task'etojn vi povas konsulti librojn, gazetojn kaj geamikojn.

La regularon vi trovas en la numero: 1/01 (96), marto 2001.

La plej lertaj solv'intoj de la junia numero (redaktis kaj korektis: Geza Kurucz):

**1-a kategorio:** Ágnes Gulyás (IK), HU: 26 poentoj

**2-a kategorio:** Ema Cukrov, HR: 28,5 p.; Ivana Bekavac, Svijetlana Akik, Samanta Cajic, ĉiuj el HR: 28 p.; Marija Mitevska, MK: 28 p.

**3-a kategorio:** Erko Maki, FI: 30 p.; Mária Molnár, HU: 29,5 p.; Lence Rfremova, MK: 27,5 p.

**Sum'ig'itaj (post du turniroj: marto, junio) poento-nombroj:**

**1-a kategorio:** Ágnes Gulyás, HU: 54 p.; Elna Tauriainen, FI: 23 p.

**2-a kategorio:** Marija Mitevska, MK kaj Samanta Cajic, HR, ambaŭ kun 56 p.; Marina Milkovic, HR: 54 p.; Martina Greguric, HR: 52 p.

**3-a kategorio:** Mária Molnár, HU: 59,5 p.; Erko Maki, FI: 57 p.; Lence Efremova, MK: 55,5 p.; Péter Tihanyi, HU: 51 p.; Ecaterina Popoviciu, RO: 50 p.

Kompletajn listojn vi trovas en nia hejm'paĝo. Vizitu ĝin, ni petas:

[www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto](http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto)

## Daŭrigo de paĝo 17

aj lingvoinstruistoj venis kun siaj infanoj. Ili mem ne volis lerni Esperanton, sed promesis ĝentile partopreni unu tagon. Ili tiel entuziasmiĝis, ke ili restis la tutan semajnon kaj nun volas labori por Esperanto.

Post kelkaj jaroj da instruado mi komprenis la propedeŭtikan<sup>10</sup> valoron de Esperanto, pri kiu mi multe povus skribi, sed donas nur unu ekzemplon. Iam instruisto pri la franca lingvo rimarkis, ke lernantino subite bonege sukcesis en la lingvo-lernado. Li demandis:

– Ĉu vi estis en Francio dum la somero?

– Ne, sed mi komencis studi Esperanton.

Mi ofte ŝerce avertas miajn stud'antojn, dir'ante ke Esperanto estas kutim'iga. Ĝi en-tute ŝanĝis mian vivon. Ĝi donis al mi multege da laboro, sed eĉ pli da plezuro kaj senco en la vivo.

Lars Forsman

1. inklino: emo / 2. mal-ced'ema / 3. entuziasmo: arda, daŭra deziro por io / 4. la tuta vort'aro / 5. super-kapabla / 6. vort'far'iloj / 7. semestro: duon'jaro / 8. konkur'antoj / 9. super-uloj / 10. preparan, en-kondukan.

- 1 Korektu la erarajn vortojn. (Atentu, temas pri paronimoj<sup>1</sup>!) (4 poentoj)  
*Lia mosto ne-atend'ite aperis inter siaj serv'istoj.*  
*Mia plej ŝaĵ'ata floro estas roso.*  
*Oni ne rajdas kanti vespere post la 10-a horo.*  
*La inter-paroĵ'adon ĝenis muzo per sia zum'ado.*
- 2 Per afiksoj<sup>2</sup> kreu almenaŭ naŭ vortojn el la radikoj *lern-*. (3 poentoj)
- 3 Klar'igu la mallong'igojn: CO, JD, MA (3 poentoj)
- 4 Finu la proverbon: *Amikon ŝatu, ... ..* (3 poentoj)
- 5 Trovu po du sinonimojn<sup>3</sup>: *aktoro, domo, klopodi, necesa* (4 poentoj)
- 6 List'igu almenaŭ naŭ (lemezajn) stud'objektojn! (3 poentoj)
- 7 Vi trovis tre interesan mult'lingvan TTT-ejon pri Esperanto. Kiel vi sciigas pri ĝi viajn amikojn ne esperantistojn? (3 poentoj)
- 8 Nomu tri ZEOjn (Zamenhofaj Esperanto-Objektoj) en almenaŭ tri landoj. (3 poentoj)
- 9 Donu la nomon de la nova prezidanto de UEA. (2 poentoj)
- 10 Venu de la vorto *benko* al la vorto *ŝarko*. (2 poentoj)  
 (De vorto al vorto vi rajtas ŝanĝi ne pli ol unu literon.)

La solvojn sendu al: *Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio*  
 Ret'adreso: <[mbelosev@public.srce.hr](mailto:mbelosev@public.srce.hr)>

1. simil'sonaj vortoj / 2. vort'far'iloj / 3. vortojn kun sama aŭ simila senco.

### Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 2)

1. *selo-ŝelo / cia-ĉia / si-ŝi / regi-reĝi / horo-horo / juro-juro / igi-igi...*
2. *maljuna, (mal)juneco, (mal)junulo, (mal)junularo, rejuniĝi, junigi, junulino...*
3. *Esperanto estas unu el la plej noblaj ideoj de la homaro.*
4. *esplori / observi*
5. *etulino, fiularo, estraraneco, ilarujo, malebleco, malindeco, diserigi\**
6. *Kara Johana, okaze de via naskiĝtago mi kore bondeziras al vi.\**
7. *Nia vendejo estas malfermata je la 6-a matene.*
8. *UN en Novjorko (Usono), Unesko en Parizo (Francio)*
9. *La 57-a IJK kun-venis en Strasburgo (Francio).*
10. *duboj / bobo*

\* *ekzistas ankaŭ alia(j) ĝusta(j) solvo(j).*

## Ĉiu-tage en lernej'

Mi lernejon ja ŝat'egas,  
ĉar min sci'vol'emo regas.  
Mi kalkulas, skribas, legas.  
Paŭzoj ne allogas plej.  
Ĉiu-tage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Kvankam lacas mia brako  
mi pri ĉiu instru'fako  
libron portas en la sako  
– lego-libro pezas plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Sam'klas'anoj tie multas,  
kelkaj stultaj<sup>1</sup> nur tumultas<sup>2</sup>.  
Instru'adon mi aŭskultas,  
ĝi min interesas plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Teatr'aj', literaturo,  
kanto el la partituro<sup>3</sup>,  
desegn'ajo sur la muro  
– arto min ĝu'igas plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Laura Aleinus

Plezur'iga estas sporto,  
gimnastike<sup>4</sup> kreskas forto,  
sed lud'ado sur la korto  
tamen plaĉas al mi plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Instruiston mi respektas  
vere – mi ne nur afektas<sup>5</sup>!  
Misojn milde li korektas,  
tial mi lin amas plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.



Li postulas, ke en-tute  
ĉiuj agu bon'kondukte.  
Ni ne batu, absolute<sup>6</sup>,  
eĉ se ni koleras plej!  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lernej'.

Per informo kaj per sperto  
li instruas nin kun lerto,  
instig'ante kun aserto:  
Mem pri-pensi nepras plej.  
Ĉiutage ion novan  
oni lernas en lerneĵ'.

Sed ne ĉie la infanoj  
povas iĝi lerneĵ'anoj  
pro mal-riĉo aŭ mal-sanoj.  
Tion mi bedaŭras plej,  
ke neniam ili povas  
ion lerni en lerneĵ'.

Mazurko

Muziko: Vesa Pölkki

Mi lern - ej - on ja ŝat - eg - as, ĉar min sci - vol - em - o re - gas.  
 Mi kal - ku - las, skri - bas, le - gas. Paŭ - zoj ne al - lo - gas plej.  
 Ĉi - u - ta - ge i - on no - van o - ni lern - nas en lern - eĵ'.

© 2001 Vesa Pölkki & Anja Karkiainen

1. mal-saĝaj / 2. grand'amase kun-estas / 3. tuto de plur'instrumenta kompon'ajo / 4. gimnastiko: sporto-branĉo, arto de korpaj movoj / 5. ŝajn'igas ne-naturan bon'eduk-it'econ / 6. en-tute (ne).

*Se vi havas ebl'econ, ne forgesu pri la  
kompat'indaj ek-esperantistaj infanoj, gejunuloj,  
kiuj multe bezonas vian helpon.*

*Vi trovas ilian liston en nia hejm'paĝo:*

<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

# Nov'ajoj de

## Vinilkosmo Vinilkosmo'

**P**ost sia partopreno en la KD<sup>2</sup> *Sur-voje* de la franca grupo “*la Kompanoj*”<sup>3</sup> (ĝi aperis en Kolekto 2000) *Thierry Faverial* [Tjერი] nun re-venas kiel sol'isto<sup>4</sup> kun *Duone*, en kiu li rolas kiel kompon'isto<sup>5</sup>, muzik'isto, kant'isto kaj aŭtoro de kelkaj tekstoj, por prezenti dek kanzonojn<sup>6</sup>, kies plej granda parto estas originala<sup>7</sup>.

**T**hierry estas kon'ata por tiuj, kiuj partoprenis la 83-an Universalan Kongreson (UK) en Montpellier, kie li montris sian talenton<sup>8</sup> kant'ante kaj gitar'lud'ante en la spektaklo<sup>9</sup> “*La Vel'ado*”<sup>10</sup>, prezent'ita de la

Kompanoj. *Duone* miksas trajtojn de intim'eca<sup>11</sup> latin'jazo kun diversaj ritmoj de la eŭropa kanzon'aro. Ĉiu el la titoloj estas invito al vojaĝo, en aparta etoso<sup>12</sup>, kiu foje kondukas al revemo<sup>13</sup> aŭ dramo, foje al voluptemo<sup>14</sup> aŭ poezio<sup>15</sup>.

## “DUONE”



La KD *Duone* ne nur duone tuŝos vin, vi estos tute kapt'ita.

**R**eferenco<sup>16</sup> de la albumo en la Vinilkosmo-katalogo<sup>18</sup>: **VKKD 42**.

Tiu nova albumo estas mend'ebla ĉe *Vinilkosmo*, FR-31450 Donneville, Francio. Eblas konsulti kaj mendi ĝin en la TTT-ejo de Vinilkosmo:

[www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com)

**S**e vi havas al-iron, nepre vizitu la hejmplaĝon de Vinilkosmo aŭ demandu ilin pri detaloj laŭ la ret'adreso:

[vinilkosmo@esperanto.org](mailto:vinilkosmo@esperanto.org)

1. nomo de iu el-don'ejo de muzikaj verkoj / 2. kompakta disko (CD) / 3. amikoj / 4. kiu kantas sola / 5. verk'isto de muzikaj verkoj / 6. popular'egajn kantojn / 7. ne-prunte-pren'ita / 8. ne-ordinaran kapablon / 9. arta prezent'ajo / 10. velo: vento-tuko / 11. kor'amike proksima / 12. anim'stato, humoro / 13. rev: mediti pri estontaj agrabl'ajoj / 14. seksa deziro / 15. arto de poemo-verk'ado / 16. orient'iga aludo / 17. listo pri la tuta verk'aro de eldonejo, biblioteko.

## FORMIKO kaj KOLOMBO<sup>1</sup>

Iam, post pluvo, formiko falis en flakon<sup>2</sup> kaj ekkriis:

“Helpu, helpu, mi dronos!”

Apud la flako staris granda arbo. Unu branĉo de la arbo preskaŭ tuŝis la akvon.

Sur la arbo sidis kolombo, kiu vidis la formikon en danĝero kaj diris:

“Mi ĵetos folion sur la akvon. Sur-iru ĝin, kaj vi povos el-iri al la bordo.”



La kolombo ĵetis folion sur la akvon. La formiko sur-iris ĝin kaj, post kelka tempo, la vento portis ĝin al la bordo.

“Bona kolombo. Vi savis mian vivon. Mi ĉiam memoros vin.”

Iun tagon, poste, venis al la arbaro

viro kun ĉas'pafilo. La kolombo faris sian neston<sup>3</sup>. La viro pensis: “Mi mort'igos tiun kolombon” kaj li celis ĝin per la pafilo.

Sed proksime estis la formiko, kiu vidis ĉion. La formiko al-kuris, sur-iris la piedon de la ĉasisto kaj pikis lin en la kruron.

La viro kriis: “Ho, mia kruro!” kaj for-ĵetis la pafilon por grati<sup>4</sup> sin.

La kolombo for-flugis. Poste ĝi serĉis la formikon kaj diris al ĝi: “Dankon, amiko. Ĉi-foje vi savis min. Ni kune manĝu maizon<sup>5</sup>.”

Kaj ili kune iris gajaj.

El la hispana tradukis:

*Jozefo de Jesús Campos Pacheco, Kubo*

1. vidu la bildon / 2. akvo-kolekt'ajon en kav'eto / 3. birdan loĝ'ejon / 4. tiri ungojn sur la haŭto por for-igi dolor'senton / 5. cilindro-forman frukton kiu konsistas el multaj ruĝ'ete flavaj semoj.

## Saĝa respondo

Foje, knabo en-iris vend'ejon por aĉeti pomojn.

"Bon'volu doni al mi pomojn por 20 dinaroj<sup>1</sup>", li diris al la vend'isto.

Kiam la vendisto donis al li la pomojn, la knabo nombris ilin kaj diris:

"La lastan semajnon ankaŭ mia patrino aĉetis ĉi tie pomojn por 20 dinaroj, sed ŝi ricevis pli da pomoj ol mi ĵus ricevis. Kial vi donis al mi malpli?"

"Ne demandu tro", kolere respondis la vendisto. "Mi estas okup'ata kaj ne havas tempon por vi."

"Mi bedaŭras, sinjoro, sed..."

"Ĉio estas en ordo, kara knabo" diris la vendisto. "Ĉu vi ne komprenas? Ju malpli da pomoj vi ricevas,



des malpli pezan sakon vi devas porti."


"En ordo", diris la knabo kaj donis 15 dinarojn kaj, poste, ek-iris.

"Re-venu!" ekkriis la vendisto. "Vi donis malpli da mono".

"Ĉio estas en ordo", respondis la knabo. "Ĉu vi ne komprenas? Ju malpli da mono vi ricevas, des malpli vi devas kalkuli."

Zoran Ĉirić, Jugoslavio

## Moderna historio



glaseto sekvis alian ĝis, fine, ni trovis nin en la lito ...

– Ne mensogu! – interrompis lin krud'voĉe la edzino. – Certe vi denove komputil'umis kun viaj idiotaj<sup>4</sup> ret'amikoj.

Elizabeta Rajtmár, Hungario

1. dinaro: mon'unuo en Jugoslavio / 2. kun-labor'ant'ino / 3. forta alkohol'aĵo / 4. idioto: mal-saĝ'ulo.



Hejm'paĝo: <http://ips.uniroma3.it/kler>

*La redakto kore dankas al la lernantoj de bazlernejo "Ljuba Mešić", kiuj denove surprizis nin per bela kontribu'ajo.*

## VILAĜANO KAJ URSO

Iam estis vilaĝ'ano. La edzino diris al li: «Iru al la centro de la vilaĝo kaj aĉetu salon!»

Ĉar estis vintro kaj frostis, la vilaĝano bone vestis sin kaj ek-iris. Ven'ante hejmen, li renkontis urson.

La urso diris: «Se vi ne donos al mi vian kapon, mi for-manĝos vin.»

La vilaĝano cerb'umis, kiel savi sin kaj, fine, li donis al la urso sian pelto-ĉapon. La urso gust'umis ĝin, kaj estis mal-kontenta, ĉar la peltoĉapo estis amara.

«Donu al mi vian manon,» diris la urso.

La vilaĝano donis la peltoganton. Gustum'inte ĝin la urso diris: «Via

mano estas eĉ pli amara. Nun donu vian kruron!»

La vilaĝano de-prenis la boton kaj donis ĝin al la urso.


La urso denove mal-kontentis: «Via kruro estas amar'ega! For! For de mi! Vi estas amareg'ulo!»

La vilaĝano rapide for-kuris kaj baldaŭ al-venis hejmen sana kaj sen-manka, sed sen ĉapo, ganto kaj boto. El la mano li tenis salon.

*Verkis kaj desegnis:*

**Nikola Davidoviĉ**, lernanto de la tria klaso de bazlernejo "Ljuba Mešić", Zaječaro, Serbio

*Tradukis: Ge-lernantoj (helpe de la instruistino) de la kvara klaso de la sama lernejo*





“Pavlo, tiu vazo, kiun vi dis-rompis, estis el la 17-a jar'cento!”  
“Ho, bone por mi. Mi jam pensis, ke ĝi estis nova.”

*“Sinjoro, via filo ĵetis ŝtonon al mia aŭto!”*  
*“Kaj ĉu li trafis?”*  
*“Dank' al Dio, ne!”*  
*“En tiu kazo, tiu certe ne estis mia filo.”*

“Nia hundo estas tiel saĝa ke, kiam ĝi volas iri hejmen, ĝi sonor'igas ĉe la pordo.”

*Du skoltoj demandas vilaĝ'anon: “Ĉu ie tie ni povas star'igi nian tendon?”*

*“Jes, tie sur la herb'ejo.”*

*“Kaj ĉu ĉi tie, en la vilaĝo oni povas iel amuz'igi?”*

“Tio estas nenio. Nia hundo havas propran ŝlos'ilon!”

*“Certe, jes. Vespere sur tiun herbejon ni ellasos du vir'bovojn.”*

“Sinjoro instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, kion li ne faris?”

“Certe ne, Joĉjo.”

“Tio estas bona. Mi ne faris la hejm'taskon.”

*Diras unu sinjorino al alia:*

*“Estas ne-kred'eble, ke via tri-jara fil'eto jam legas gazeton?!”*

*“Ne, li ne legas, li solvas kruc'enigmon.”*

Ek-sonoris telefono. La malgranda Petro prenas la aŭskult'ilon kaj diras:

“Paĉjo ne estas hejme, ankaŭ Panjo for-estas. Estas ĉi tie nur mi, la avino kaj la kato. Mi estas ankoraŭ malgranda, la avino malbone aŭdas kaj la kato ne scias paroli. Ĝis!”

*SOLVOJ de  
MAGIA ENIGMO*

*(n-ro 97, p. 26):*

1. LAMA 2. ADAM 3.  
MALE 4. AMERIKO 5.  
ILAR 6. KARA 7. ORAN

*SOLVOJ de Novtipa enigmo  
(n-ro 98, p. 12):*

1-6. AGORDO 2-5. ONDO 4-9. ADRESO 5-  
8. ORDO 11-8. OISO 12-7. TELERO 14-11.  
OLEO 15-10. EMILIA 16-3. KIMONO 17-2.  
LAGO 17-14. LIMO 18-13. KAMILO.

*Ĉu vi volas pliajn enigmojn, ludojn, humur'ajojn?*

*Legu la revuon de RONDO FAMILIA:*

# **FAMILIA ESPERANTO**

*Skribu al la redaktorino:*

*Katarina BODNÁROVÁ,*

*Hlavná 63, SK-07631 Streda nad Bodrogom, Slovakio*

## **juna amiko**

**Internacia Esperanto-revujo de ILEI por lernejanoj kaj komencantoj**

**28-a jaro, n-ro 3 (98), 2001**

**Aperas 4 fojojn jare**

**Redaktoro: Géza KURUCZ (Hítel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)**

**Retadreso: sull267@szeged.sullnet.hu**

**Vicedaktoro kaj administranto ĝis la fino de 2001:**

**StefanMacGill (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)**

**Varba direktanto: Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, YU-18000 Niš, Jugoslavio**

**Administranto ekde 2002: Sándor Hídeg. Retadreso: hidegs@drotposta.hu**

**Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario**

**Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio**

**Lingva revizianto: André Albault (Francio)**

**Kunlaborantoj: s-ino Raita Pyhäälä, Anja Karkiainen (Finnlando), Baldur Ragnarsson (Islando), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), s-ino Jennifer Bishop (Aŭstralio), Zoran Ćirić (Jugoslavio), s-ino Saranath (Hindio), Gennadij Basov (Rusio), Bardhyl Selimi Mezin (Albanio), Tili Dahlenburg, Dieter Berndt (Germanio), Pekim Tenorio Vaz, Evandro de Freitas (Brazilo), Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz (Hungario), Marija Belošević (Kroatio), Michel Nkwirikiye (Tanzanio), Eugenia-Ecaterina Popoviciu (Rumanio), Mensah B. Attiogbe-Agbemadon (Togolando), José J. Campos Pacheco (Kubo).**


**Grafikistoj: Irina Nagy (Rumanio), Monika Molnár (Hungario), Pavel Rak (Ĉeĥio)**









**Komputila kolora tekniko: János Bakk (Hungario)**

**Farita en Presejo Saluton**

**Ĉinojn u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario**

**ISSN 0230 1318**



-   
kesto
-   
kaĝo
-   
korbo
-   
sako
-   
vojaĝsako
-   
valizo
-   
skatolego
-   
el kartono

# TRAFIKO